

Protokolo

de la 22-a Konferenco de Rusia Esperantista Unio

Volgograda regiono, la 18-an de aŭgusto 2006
(*enkadre de RET-06*)

1. Organizaj demandoj. Elekto de la konferencaj gvidorganoj.

- 1.1. Estas registritaj 12 delegitoj kun voĉdonrajto¹.
- 1.2. Elekto de la kunvengvidanto:
 - Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja) – 4 voĉoj,
 - Georgij Kokolija (Moskvo) – 2 voĉoj,
 - Valentin Melnikov (Moskvo) – 3 voĉoj.Kiel kunvengvidanto estas elektita A. Grigorjevskij.
- 1.3. Protokolantoj: Vladimir Minin (Tomsk), Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk)
– elektitaj unuanime.
- 1.4. Kalkulkomisiono: Valentin Melnikov (Moskvo), Aleksandr Morev (Puŝkin)
– elektitaj unuanime.
- 1.5. Tagordo de la Konferenco:
 - 1) Elekto de la konferencaj gvidorganoj.
 - 2) Aligo de REJM al REU.
 - 3) Raporto de la Estraro de REU.
 - 4) Pridiskuto de la raporto.
 - 5) Raporto de la Kontrol-revizia Komisiono de REU.
 - 6) Raportoj de klubaj reprezentantoj.
 - 7) Strategiaj demandoj.
 - 8) Elekto de la gvidorganoj de REU.
 - 9) Amendoj en la Ĝenerala Regularo.
 - 10) Diversaĵoj.

La tagordo estas akceptita unuanime.

2. Aligo de REJM al REU.

A. Grigorjevskij raportis pri la interkonsento inter la Estraro de REU kaj la komitato de REJM aligi REJM al REU kiel junularan sekcion.

Voĉdonado pri la aprobo de la decido de la Estraro de REU aligi REJM al REU:

por	– 12 voĉoj,
kontraŭ	– 0 voĉoj,
sindetenoj	– 0 voĉoj.
– aprobita unuanime.	

3. Raporto de la Estraro de REU.

- 3.1. Retpoŝtan raporton de la estrarano Irina Gonĉarova (Moskvo) voĉlegis G. Kokolija.
- 3.2. La raporton de la Estraro de REU prezentis la Prezidanto de REU A. Grigorjevskij (tekston de la raporto vidu en REGo № 4/2006).

¹ Poste registriĝis ankoraŭ 3 malfruiĝintoj, entute en la Konferenco estis registritaj 15 delegitoj.

- 7.3. G. Kokolija proponis rekomendi al la Estraro, ke REK kaj EoLA okazu kune. Post pridiskuto rezulte de la voĉdonado la propono estas nedecidita:

por – 6 voĉoj,
kontraŭ – 0 voĉoj,
sindetenoj – 7 voĉoj.

Post la pluaj debatoj kaj revoĉdonado la propono estas akceptita:

por – 10 voĉoj,
kontraŭ – 1 voĉoj,
sindetenoj – 2 voĉoj.

- 7.4. A. Grigorjevskij proponis kiel la ĉefan labordirekton por la venonta agadperiodo konsideri regionan (kluban) agadon.

Rezulte de la voĉdonado la propono estas akceptita: por – 13 voĉoj,
kontraŭ – 0 voĉoj,
sindetenoj – 0 voĉoj.

8. Elekto de la gvidorganoj de REU.

- 8.1. A. Grigorjevskij voĉlegis la retmesaĝon de Valentin Seguru (Moskvo) kun la peto konsideri lian deziron kandidati por la Estraro pri kunlaboro kun la ŝtataj instancoj kaj informis, ke aliaj sinproponoj pri kandidateco por la Estraro ne venis.

- 8.2. En la debatoj pri okazigo de la reelektaj dum la Konferenco, pri eblo de reta aŭ skriba voĉdonado kaj pri eblo de demisioj kaj kooptoj de estraranoj partoprenis entute 4 personoj: G. Kokolija, M. Bronŝtejn, V. Melnikov, A. Grigorjevskij.

- 8.3. M. Bronŝtejn proponis ne okazigi reelektajn de la Estraro kaj de la Prezidanto de REU kaj peti ilin plenumi siajn funkciojn ĝis la sekva Konferenco (maksimume – ĝis la 30-a de aprilo 2007).

Rezulte de la voĉdonado la propono estas akceptita: por – 10 voĉoj,
kontraŭ – 1 voĉo,
sindetenoj – 2 voĉoj.

- 8.4. Voĉdonado pri la propono: ne okazigi reelektajn de la Kontrol-revizia Komisiono kaj peti ĝin plenumi siajn funkciojn ĝis la sekva Konferenco (maksimume – ĝis la 30-a de aprilo 2007):

por – 11 voĉoj,
kontraŭ – 0 voĉoj,
sindetenoj – 2 voĉoj.

Rezulte de la voĉdonado la propono estas akceptita

- 8.5. Voĉdonado pri la propono: ne okazigi reelektajn de la Komisiitoj kaj peti ilin plenumi siajn funkciojn ĝis la sekva Konferenco (maksimume – ĝis la 30-a de aprilo 2007):

por – 12 voĉoj,
kontraŭ – 0 voĉoj,
sindetenoj – 1 voĉo.

Rezulte de la voĉdonado la propono estas akceptita.

9. Amendoj en la Ĝenerala Regularo.

- 9.1. Estis pridiskutita propono de V. Melnikov fari sekvajn amendojn en la punkto 5.9 de la Ĝenerala Regularo:

– Anstataŭigi la duan frazon de la punkto 5.9 per la frazo “La Estraro rajtas eksigi estraron, kiu ne partoprenas en la agado dum 3 monatoj.”

– En la lasta frazo de la punkto 5.9 post vorto ”demisio” aldoni vorton “eksigo”.

Rezulte de voĉdonado la teksto de amendoj estas akceptita :

por – 8 voĉoj,
kontraŭ – 4 voĉoj,
sindetenoj – 0 voĉoj.

- 9.2. Voĉdonado pri la propono: rajtigi la Estraron fari la pridiskutitajn amendojn en la Ĝenerala Regularo, se ili konformas al la Statuto de REU:

por – 10 voĉoj,
kontraŭ – 0 voĉoj,
sindetenoj – 1 voĉo.

Rezulte de la voĉdonado la propono estas akceptita.

10. **Diversaĵoj.**

A. Grigorjevskij informis la konferencon, ke Boris Zozulja (Rostov-na-Donu) proponis sian parcelon al REU por organizado de E-ripozejo.

Estis konsentite transdoni la demandon al la Estraro de REU por esploro kaj decido.

DECIDOJ
de la 22-a Konferenco de REU

1. Aprobi la decidon de la Estraro de REU pri interkonsento de REU kaj REJM aligi REJM al REU kiel junularan sekcion.
2. Taksi la laboron de la Estraro kontentiga.
3. Komisii al la Estraro de REU dum unu monato prezenti la finanĉan raporton al la Kontrol-revizia Komisiono, publikigi ĝin kaj dissendi laŭpete al membroj de REU.
4. Rekomendi al la Estraro de REU, ke RET kaj OkSEJT okazu kune.
5. Rekomendi al la Estraro de REU, ke REK kaj EoLA okazu kune.
6. Kiel la ĉefan labordirekton por la venonta agadperiodo konsideri regionan (kluban) agadon.
7. Ne okazigi reelektajn de la Prezidanto de REU, de la Estraro de REU, de la Kontrol-revizia Komisiono kaj de la Komisiitoj kaj peti ilin plenumi siajn funkciojn ĝis la sekva Konferenco (maksimume – ĝis la 30-a de aprilo 2007).
8. Rajtigi la Estraron fari la pridiskutitajn de la Konferenco amendojn en la Ĝenerala Regularo, se ili konformas al la Statuto de REU.

Volgograda regiono, la 18-an de aŭgusto 2006.

Protokolis: G. Terentjeva,
V. Minin.

Finpretigo de la protokolo: la 8-an de septembro 2006.